

Pri la infanoj de la esperantistoj
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 655, 1983.01.20 & 22

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Oni neniam sufiĉe agnoskos la grandan helpon, kiun radio-elsendoj alportas al la esperanto-lernantoj, kiuj ĝenerale estas aŭtodidaktoj. Tiurilate ni deziras citi eron el letero de s-ro Jean Calamy en Gémenos, Francio. Li skribas : « De mallonga tempo (unu jaro kaj duono), mi lernas mem esperanton. Bedaŭrinde la kontaktoj kun samideanoj estas maloftaj. Do, kvazaŭ izolita lernanto mi havas nur du fontojn por aŭskulti la lingvon internacian: la magnetofonon kaj la radio-elsendojn. Rilate al tiu lasta rimedo mi deziras sciigi al vi la plezuron, kiun mi havis hieraŭ aŭskultante vian paroladon pri la movado kaj la juneco. La kvalito de la sendaĵo estis tre bona kaj la priparolado tre interesa. Mi konsilas al miaj kelkaj amikoj la aŭskultadon de Svisa Radio Internacia. Gratulon pro via agado, kiu alportas grandan helpon al la aŭtodidaktoj."

A.- Tiu elsendo pri esperanto kaj la juna generacio kaj aliaj elsendoj pri la instruado de esperanto, kiujn ni realigis kun esperanto-ĝelernantoj, havis grandan eĥon en la leteroj de niaj aŭskultantoj. Jen ni citas kelkajn erojn de leteroj:

Cl.- Walter kaj Alice Peake en York, Britio ne kapablis esperantigi la proprajn filojn. Ni citas ilin: "Ni havas du filojn sed ili neniam havas ian deziron lerni la lingvon. Ni neniam devigis ilin sed ili ofte aŭdis aŭ eĉ renkontas alilandajn esperantistojn, kiuj vizitis nin. Ni konas kelkajn esperantajn geparencojn, kiuj spertas la samon."

A.- En niaj radio-prelegoj ni ĝuste bedaŭris, ke la esperanto-organizaĵoj nenion faras, por ke la gefiloj de la esperantistoj, ekde sia junaĝo, sin sentu rekte ligitaj al esperanto. Estas pro tiu neglekto de la infanoj fare de la esperanto-movado, ke esperanto ne fariĝis socia fenomeno hereda. Ni baldaŭ eniros en la duan jarcenton de la lingvo, sed al ĝi oni ne alvenas pro familiaj kaŭzoj, sed ĝenerale pro idealo kaj memlekto. Ekzistas pli kaj pli esceptoj, sed ĝenerale tiuj pli malpli denaskaj esperantistoj, kiel oni nomas ilin, fakte faris pli ol simple sekvi la gepatrojn. En ilia vivo ĉiam ekzistas preciza periodo, kiam ili memstare aliĝis al la lingvo, finstudante ĝin kaj akceptante ekludi sian rolon de lingvoportanto. Ĝenerale tiu ĉi evoluo estas ligita al la aktiveco de junulara organizaĵo, kaj la kongresoj de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo ludas tiurilate tre pozitivan rolon.

Cl.- Ĉiam el Britio alvenis alia reago koncerne nian temon. S-ro Bruno Najbaro en Keigley skribis: "Kiom gesinjoroj Gacond pravas pri la neglekto de la juna generacio kaj ankaŭ pri la sukceso ĝfojigi kaj interamikigi la infanojn en Grésillon. Mi ĝojas aŭdi, ke ankaŭ en Svislando nun estas tie feriejo por familioj." Kaj en alia letero li aldonis: "Kun granda intereso mi aŭdis ĉivespere pri la eblecoj por infanoj ĉe Kultura Centro Esperantista, kaj pri spertoj kun ili. Nu, se mi sukcesos viziti la Centron iam ankaŭ mi pretos helpi iom ĉe la nova generacio." fino de la citaĵo.

A.- Ĉijare la Semajnfinoj por Infanoj kaj Esperanto-Familioj okazos je la ĉisekvaj datoj: 5-an kaj 6-an de februaro, kaj la okupo estos la skiado kaj sledado apud la perbilda studado de esperanto. Dua semajnfino okazos la 30-an de aprilo kaj 1-an de majo. Se la jonkviloj ankoraŭ floros kaj se la vetero tion ebligos, migrado kondukos al paŝtejoj, kie tiuj belaj printempaj floroj abundas. Antaŭ la somero estas ankoraŭ planita Semajnfino por Infanoj kaj Esperanto-familioj por la 18-a kaj 19-a de junio. Sur la suprojn de la montaro Ĵuraso ĝi devus permesi

ekskursi. Post la ferioj nova infana semajnfino okazos la 27-an kaj 28-an de aŭgusto, alia rendevuigos ilin la 24-an kaj 25-an de septembro kaj la lasta infansemajnfino de la jaro 1983 okazos la 5-an kaj 6-an de novembro.

Cl.- En novembro pasintjara la Semajnfino por Infanoj kaj Esperanto-Familioj disvolviĝis en tre agrabla etoso malgraŭ terure aĉa vetero. Neĝis kaj pluvis senĉese, do tial ne estis eble migradi. La dinamismo de la infanoj esprimiĝis en la pentrado de belaj afiŝoj kun argumentoj favoraj al esperanto. La plej sakcesa artaĵo montras grandan birdon kun siaj idoj en belega montara pejzaĝo multkolora. Kaj el la cerbo de la birdo eliras granda bulo kun la franclingva penso: "C'est le moment que je leur apprenne l'espéranto" (alvenis la tempo lernigi al ili esperanton). Alia okupo estis la kreo de lumbildaj rakontoj. Sur arkitekta papero la infanoj kaj la edukistoj desegnis bildrakontojn, kaj ili verkis la necesajn klarigojn, kiujn ili esperantigis kaj poste registris. La vizitantoj de Kultura Centro Esperantista povos tiel amuziĝi spekti tiujn aŭdvidajn prezentaĵojn kiuj estas tre ofte spritaj kaj imagplenaj. La manlabora okupo estis dediĉita al konstruo de fluganta drako, kiun la aĉa vetero malhelpis enĉieligi. Alia manlabora okupo estis la fabrikado de dekoraciaĵo per gluado de ŝtofpecoj. Kiel vi konstatas, la infanoj ne enuis.

A.- Ankaŭ la edukistoj ne enuis. Kaj ĝojige ilia nombro ĉiufoje kreskas. Oni povas tiel antaŭvidi la formadon de du edukistaj grupoj, kaj tio igos ilian taskon malpli streĉan, kio permesas antaŭvidi ses tiajn aranĝojn dum la jaro, dum la pasinta jaro okazis nur tri semajnfinoj por infanoj. La espero estas, ke foje povos disvolviĝi esperanto-ferioj por infanoj kaj esperanto-familioj dum la somero kaj eble dum la vintro. Sed unue devos ankoraŭ kreski la disponebla edukistaro kaj kreiĝi pli da tranoktejoj en la Gastejo Edmond Privat.

Cl.- Konklude al tiuj novaĵoj pri la porinfana aktiveco en Svislando ni ankoraŭ salutos du aŭskultantojn, kiuj sin esprimis perletere koncerne la temon infanoj kaj esperanto-instruado. Ili estas C. E. De Boer en Beverwijk, Nederlando kaj John Brownlee en Upminster, Britio.

A.- Kaj dum la minuteto, kiu restas, ni ankoraŭ salutos en Ĉeĥoslovakio s-ron Frantisek Stejskal, kiu loĝas en Osek, en Okcidenta Germanio a-ron Detlef Meier, kiu loĝas en Stuttgart, en Sovetio s-ron V. R. Ŝiŝko, kiu loĝas en Minsk, en Svedio s-ron Jan-Olof Svensson en Tidaholm kaj en Francio s-ron Alain Chalm en Le Havre kaj s-ron P. Cugny en Dijon. Al ĉiuj ni esprimas niajn dankojn pro iliaj aŭdraportoj kiuj estas atestaĵoj, ke ni ne parolas en etera dezerto.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond diras al ĉiuj: ĝis reaŭdo!